

P A C O kaj J U S T E C O .

Orgaan de la M^o.beweging:
"Paco kaj Justeco" BRUGGE.

Voorzitter : Drs. F. ROOSE - J. & M. Sabbestraat, 12, BRUGGE.

Advertentie: Secretariaat: ROOSE - D^o KRSGI - T^o R,
J. & M. Sabbestraat, 12, BRUGGE.

Propaganda : Grégoire MAERTENS, Nieuwstraat, 54, ASS^o BRO - K.

Postrekening nr: 479170 van DE KRSGI - T^o R H.
J. & M. Sabbestraat, 12, BRUGGE.

STRANGAJCJ PRI LA RID-TO.

Ke la rido estas donita nur al la homo kaj lin, kiel la lingvo dif-ferencigas de la besto, oni jam ofte akcentis por signi la altan valoron de zoi tiu kapablo. Jam Aristotelo observis, ke la infanoj pli frue ploras ol ridas kaj el tio konkludis, ke la rido komenciĝas nur kun la ekheligo de la spirito. La poetoj laudis ĉi tiun gajigon de la mieno kiel la vid-ebligon de la anima ĉarmo, kaj klera pastro eĉ volis konkludi el la ton-ulo ridas hahaha, la flegmulo hehehe, la melankoliulo hihii kaj la sang-vinulo hohohe.

Karl Julius Weber, la "ridanta filozofa" plivastigas ĉi tiun psi-kologion de la rido: "Laŭ regulo, la plena laŭta rido esprimiĝas per A; la moka rikana prksimiĝas al E; la gongrido de la junularo kaj de la be-la seksa similas al I (sed ankaŭ tiu de la "sorĉistinoj"); la gaja rido de la surpriza gojo al O, kaj la U ŝajnas farita por la ploro aŭ por la rido ĝis la sukoko, ĉe kiu oni estiĝas ruĝa kaj blua. Laŭregule, la viroj ridas per A kaj O, la virinoj per E kaj I."

La amaran, deviganta ridon la prauloj nomis "sardona", ĉar ili komparis ĝin kun la spasma kuntirigo de la ridmuskoloj, kiu estas kaŭzata de la "ridherbo" (apium risus) sur la insulo Sardinio. Ke tio forta rido povas dolori efiki, ĉi scias. Oni parolas ofte eĉ pri "mortridi sin" kaj ke tio ne estas nura frazo, volis pruvi instruitulo de la baroko, R. Textor en latine skribita libro, en kiu li priskribas grandan accon da viroj. Kiuj, laŭ onidiro, mortis pro troa rido. Li priskribas ĉi tie inter aliaj la grekan pentriston Zeuxis, kiu estis sia mortridanta pri maljuna virino de li mem pentrita, kaj la famaĉan verkiston de la renesanco, la "princo-skurĝon" Pietro Aretino, kiu eĉ orgio tiel forte ridis, ke li sveninte falegis de la seĝo kaj ne pli rekonsciigis.

Pli ofte oni akcentis la bonan efikon de la rido kaj rekomendis ĝin eĉ kiel sanigilon. "Rido estas saia", diras la proverbo. Minna von Barnhelm de Lessing diras "Rido faras nin pli prudenta ol ĉagrenon, ĉar oni pli ĝuste prijuĝas la cirkonstancojn." La granda angla humoristo Sterne diras: "Se oni ridetas, kaj ankoraŭ pli se oni ridas, oni ion aldonas al la malgranda tempospaco de la vivo." La fama holanda kuracisto Sydenham asertas, ke la alveno de arlekono en urbeto estas duble pli valora ol la alveno de dudek azenoj sargitaj per medikamentoj. Dank' al la spritajoj de amuzistoj eĉ la manĝotable, la altaĵ sinjoroj promesis al si bonan efikon je ilia digesto. Ĉi tiu bona efiko ankaŭ tute serioze estis observata de multaj kuracistoj. La franca kuracisto Tissot skribis libron, en kiu li diras, ke per la rido danĝeraj abscesoj estis malfermitaj; estis ferigita la angla malsano eĉ infanoj, se oni tiklis kaj per tio ridigis ilin. Rido, laŭ li, kuracas stomakdolorojn kaj hipoĉondrion kaj estas sendanĝera ilo kontraŭ intestaj gascj.

Erasmus de Rotterdam foje raportas, ke li devis tiom ridi pri le-teroj; ke pro tio al li diskrevis absceso. Kiam Gleim visitis la vunditan poeton de la printempo, Ewald van Kleist, li laŭtlegis al li iun el siaj plej gajaj kupletoj. Tiu ekridis pri ĝi tiel, ke krevis al li arterio kaj la vundkuracisto diris, ke tio estis granda feliĉo per la paciento, kiu eĉ tie kvazaŭ faris mem al si sangeltiron.

La aŭstria ŝtatisto von Born estis jam rigardata de la kuracistoj kiel nesaniĝebla. Eniris nigrulo la ĉambro, kiu estis sendita de la im-periestrino Maria Terezia, por demandi pri lia saastato. Lia fratino, kiu timis pri la beato de la liberpensulo, ekkriis: "Sinjoro Jesuo, ĵen pren-os lin la diablo!" Iri tio Born tiel elkrevis ridis, ke li resaniĝis.

Malbonhumoraj homoj plej ofte estas maldikaj kaj la prauloj asert-is, ke eĉ homoj, kiuj neniam ridas, jam per tio montriĝas malsano de la animo. Ke afabla rideto en la societo rekomendas, estas malnova regulo, kiu estas donita en multaj "konvene-libroj". La "keep smiling" de la amerikanoj same postulas ĉi tiun konvencian gajecon, kiu nature povas rid-igigi ĝis senanima malpleno.

.....

Jen la Estraro.

Por tiu periodo, la monato Oktobro, la estraro devas gratuli kvar gombrojn, inter kiuj du novajn anojn de la laste kurso, pro ilia naskitagreveno.

- 1/ Fraŭlino Maertens Gilverte, nova membrino, naskita la 3-10-28.
- 2/ Fraŭlo Gallowant Carlos, fidela redaktimembro, kiu prizorgas la desegnaĵojn, naskita la 11-10-25.
- 3/ Fraŭlo De Baets Etienne, la fankonata S.S.B. Direktoro kaj samtempo membro de la estraro, de la redakcio, de la festkomitato, de la "Vrijgezellenclub", de la "Rederijkerskamer" kaj delegito de F.U.E.S., naskita la 24-10-23.
- 4/ Fraŭlino Lambert, kiu ankaŭ estas novulino, naskita la 28-10-28.

"SUR LA KAMPO" 1945

Soldato D.B. Richardson.

Sur la kampo neĝo brilas
 Blanke sub la pala luno;
 Kie tage ni batalis,
 Kelkaj venkis, kelkaj falis,
 Regas nokta paco nun.

La pasantaj ombroj estas
 Nur fantomoj de l' memor';
 Scenoj el la infaneco,
 Revoj de la pasinteco,
 Flej proksimaj al la kor'.

Bombardado malproksima
 Tkrugiĝas en ĉiel';
 Kvazaŭ sango de l' mortintoj
 Kaj la ardo de l' venkiatoj
 Interniksas en pastel'.

Venas pensoj pri la hejmo,
 Trans la blua selondar';
 Pri la patro kaj patrino,
 Kaj la kara amabino,
 Kaj fidela amikino.

Tio staras ni la gardon,
 Dum kunoj en tranĉo;
 Dormas pace sur la neĝo;
 De mi supren iras preĝo
 Ke la dorm' rompiĝu ne.

Mi revenos, ho, fantomoj!
 Baldaŭ kune estos ni;
 Nun, dum ombroja ni nigurdas,
 Ne mi via, sed vi mia gardas;
 Kaj trankvila restas mi.

Io novas; malamiko ?
 Haltu, formoj, kiuj ajn!
 Kiaj aĵoj tiel iras,
 Marsas kaj nenion diras,
 Ho, silenta noktotrejn' ?

(el American Esperantist: May-Jun. 1945.)

(Daŭmigo de paĝo 1.)

Malnova germana proverbo avertas: "Ne ĉiuj estas amikoj, kiuj nin alridas." Ke oni per rido povas gajni ankaŭ batalojn, pruvas epizodo en la egipta militiro de Napoleono. Kiam la divizio Friants estis atakita de la araboj, li donis la ordonon: "Formi kvarangulon, la azenojn kaj la scienculojn en la mezon!" Pri tio estiĝis en la francaj vicoj tia laŭta ridado, ke la araboj forkuris. El ĉi tiu okazajo deduktis la prusa generalo von Bülow la instruon, ke la soldatoj ridante ataku, por malbruciĝigi la kontrahulon.

(el Literatura Mondo: Julio-Aŭgusto 1936.)

(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)

Vlaamsche Esperantistea, uw blad is
 FLANDRA ESPERANTISTO.
 uitgebruid, actueel, interessant, veelzijdig, goed ingelicht.
 Uitgegeven door Flandra Esperanto-Instituut v.z.w.
 Instelling voor Esperanto-Onderwijs & Propaganda.
 Redactie & Administratie: P. Van Hambeekstraat, 3, BRUSSEL-WEST.

Losse nummers: 5 FR. Abonnement tot einde 1945 (8 Nrs) 36 FR.
 Postrekening 3268.51 van F.E.I. BRUSSEL.

(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)(-)

irkau la Mondo

Bronnen: F.E. Flandra Esperantisto - A.E. American Esperantist.

Belgie:

Antwerpen: + Op verzoek van de E.K.I. (Esperanto Komitato Inter-grupa) heeft het stadsbestuur besloten aanstaanden winter officiele avondcursussen van Esperanto in te richten. F.E.

+ Op 15 December wordt een groot Esperantofest ingericht. Leden der K.N.S. (Koninklijke Nederlandsche Schouwburg) verlenen hun medewerking. F.E.

Engeland:

+ Brita Esperanto Asocio keert naar London terug. Adres: 140 Holland Park Avenue London W 11 F.E.

+ Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj willen Esperanto op het programma der Britsche scholen. Meer dan 100 schoolhoofden ondersteunen het voorstel. F.E.

+ De ĉefperanto van de Britsche sekte der: Tutmonda Junular Organizo (T.J.O.) is: S-ro Holland 61 Vandijke Road Leighton Buzzard Beds F.E.

Frankrijk:

+ Admiraal Rollet de l'Isle (die gedurende de 2e wereldoorlog stierf) heeft in 1940 beproefd spijts de Gestapo Esperanto verder publick te propageeren. Na een strenge tusschenkomst der Gestapo besliste hij Esperanto verder als ondergrondse beweging te laten doorgaan. A.E.

Brazilie:

+ Esperantopogels van het 10e Braziliaansch Esperantokongres worden op postkaart gezonden aan wie het wenscht. Eenvoudig een postkaart zenden aan S-ro Antonio S. Varão Rua Luiz Gurgel 101 Eng. de Dentro Rio de Janeiro. F.E.

Egypte:

+ Het eerste Egyptische Esperantokongres werd gehouden te Cairo. Voorbereidingen worden getroffen voor het tweede te Alexandria. Er waren onder andere volgende nationaliteiten vertegenwoordigd: Groot Britanië, Nieuw Zeeland, Polen en Grickenland. A.E.

+ Esperantokluboj werken te Cairo, Alexandria, Fayoum en Port Said. A.E.

China:

+ Een Esperanto cursus werd aan de Universiteit van Kunming gegeven. A.E.

+ In Oktober 1944 werd een volledig Esperanto-Chineesche woordenboek uitgegeven. A.E.

+ "Heroldo de Ĉinio" verschijnt regelmatig. Het is een sleutel voor het kennen van het Mysterieuze China. A.E.

RADIO.

-Talrijk zijn de Esperanto uitzendingen in de Braziliaansche radio. Iedereen Zaterdag wordt een Esperanto program ingelast in het "Universitaire Uur" uitgezonden door het Radio-station van den Minister van Opvoeding. Iedereen Donderdag geeft het zendstation van Rio de Janeiro een Esperanto-program met Dr Mario Ritter Nunes en Senorita Maria da Iza Costa als medewerkers. A.E.

Verder gebruiken private stations uit Rio de Janeiro, Sao Paulo en Pernambuco ook Esperanto. A.E.

-We hopen zoo gauw mogelijk zendtijden en golflengten, voor zoover ze voor ons hoorbaar zijn, te publiceeren.

+ Wij beluisteren de Esperanto-Radio Uitzendingen:

Den Zondag:

Lille P.T.T. 248 m van 09.15 tot 09.30

Den Vrijdag:

B.N.R.O. Kortrijk 225,5 m van 21.00 tot 21.15

REVUO DE REVUOJ.

FLANDRA ESPERANTISTO 13 jaar N°4 (134) Augustus 1945.

Redactie en adm. P.v.Humbeekstraat 3, Brussel West. P.O.N. 32685 van P.T.L. prijs 5 fr.